

Vizi László


La hungara literaturo kaj hungaria apero de Esperanto

– verkita por El Popola Ĉinio –

La komenco de hungara literaturo kaŝiĝas sub la vualo de praaj tempoj, antaŭ proksimume tri mil jaroj, kiam la hungara lingvo apartiĝis de sia origino. (Pro nuntempaj akraj kaj ne ĉiam afablaj diskutoj mi ne volas eksplicite esprimi opinion pri la konkreta deveno de nia lingvo.) Kia estis la praa hungara literaturo, tion oni povas nur konjekti surbaze de multe pli postaj konataj literaturaj pecoj kaj eroj.

La hungaroj ĝis la dua parto de la naŭa jarcento post Kristo kiel nomadaj triboj migradis en la regionoj de Okcident-Azio ĝis Orient-Eŭropo. Kvankam ili konjekteble jam konis specialajn literojn (rovaŝo), tiamaj hungarlingvaj skribitaj dokumentoj ne troviĝas inter la arkeologiaj malkovraĵoj.

Laŭ la plej akceptata historia opinio la hungaroj en 895 post Kristo okupis tiun teritorion en Mez-Eŭropo, kiu poste nomiĝis Hungario. Tre baldaŭ - precipe pro kialoj politikaj - la hungaroj akceptis kristanismon. Pro tio la skribita kulturo tiutempe aperis en la tiama "esperanto" de la katolika eklezio, nome en la latina lingvo, kaj ankoraŭ longe tiu lingvo restis la ĉefa peranto de hungara skribita literaturo, kvankam ekde la 13-a jarcento ni jam konas ankaŭ hungarlingvajn pecojn.



En la 16-a jarcento hungarlingvaj literaturaĵoj grave plioftiĝis, sed ĝuste tiam komenciĝis 150 jara turka, poste Habsburga okupado, kiuj grave malhelpis la prosperon de la hungara literaturo.

En la dua parto de la 18-a jarcento kaj komence de la 19-a rapide plifortiĝis la hungara nacia konscio kontraŭ la subpremo de la imperiestra dinastio Habsburg, kaj la uzado de la hungara lingvo fariĝis grava demonstrilo same kontraŭ la subpremo, kiel por la hungara sendependeco. Granda parto de la hungara literaturo aperis en tiu epoko kune kun klopodoj renovigi kaj riĉigi la hungaran lingvon.

Kvankam la oficiala literaturhistorio difinas tiun epokon, nomatan "reformepoko", ĝis la nesukcesa revolucio kaj liberbatalo de 1848, tamen mi opinias, ke ĝia literatura tendenco daŭris plu preskaŭ ĝis la komenco de la 20-a jarcento, kiam en Hungario aperis la modernaj okcidenteŭropaj skoloj.

En la 20-a jarcento aperis modernaj, ne malpli eŭropaj ol hungaraj verkistoj, kiuj ne nur el nacia, sed ankaŭ el internacia vidpunkto komprenis la situacion de hungaroj, kaj klopodis integri nian kulturon en la tutmondaj tendencoj. Ne malmultaj el tiuj verkistoj rimarkis ankaŭ la gravecon kaj taŭgecon de Esperanto por internacia komunikado.

Unu el tiuj gravaj hungaraj verkistoj estis s-ro Ignotus, unu el la fondintoj de la plej grava hungara literatura gazeto kun la titolo: Okcidento. Li postlasis ne tre multajn, sed multspecajn verkojn (inter ili kritikojn, eseojn, studaĵojn, poemojn). Li skribis pri Esperanto:

"Antaŭ kvin aŭ ses jaroj mi verkis studaĵon pri la mondlingvo (kiun studaĵon mi aperigis ankaŭ en libro kun la titolo "Eksperimentoj"), nome pri tio, ke laŭ scienca vidpunkto ĝi nepre povas ekzisti, kaj la lingvo Esperanto de Samenhof (aŭ kiel li mem skribas esperante "Zamenhof") estas taŭga fariĝi tia lingvo. Miaj opinioj tiam prezentitaj - se mi relegas ilin - eĉ nuntempe povas min konvinki: eĉ nun mi estas certa, ke el scienca vidpunkto, do laŭ la naturo kaj sprito de homo nenio kontraŭdiras la eblon: ne nur elpensi, sed ankaŭ akcepti kaj prosperigi tutmondan planlingvon. Tamen, miaj iamaj amasigitaj argumentoj nuntempe jam ŝajnas al mi palaj kaj malfortaj kompare al tiu sola sed konkreta fakto, ke nun jam fakte ekzistas la artefarita, ĉie akceptata kaj ĉie samforme uzata mondlingvo."

En 1918 hungaraj esperantistoj, inter ili konataj verkistoj, fondis Esperanto-organizon "Propaganda Komitato de Internacia Lingvo". Ĝi fakte estis asocio, ne komitato. La prezidanto estis Bíró Lajos (prononcu: Biro' Lajoŝ, familia nomo: Biró) verkisto. Inter la ceteraj membroj ĉeestis vaste konataj hungaraj intelektuloj de tiu epoko, do lingvistoj Balassa József kaj Simonyi Zsigmond, literaturhistoriisto Schöpflin Aladár, verkistoj Karinthy Frigyes, Kosztolányi Dezső, poeto kaj tradukisto Rajczy Rezső.

La tradukitaj verkoj - plejparte humuraj - de Karinthy baldaŭ fariĝis tre popularaj inter la esperantistoj tutmonde. Kelkaj liaj tradukitaj verkoj: "Morgaŭ matene" , novelaro "Norda vento", iom poste satira romaneto "Vojaĝo en Faremido", kaj multaj mallongaj pecoj aperadis.

La "Vojaĝo en Faremido" estas lerta apliko de la figuro Gulliver el la fama romano de Jonathan Swift. Karinthy kreis absurdan mondon kie regas la absoluta muziko. Estus eraro pensi, ke en tiu verko aperis pratipo de sciencfikciaj romanoj, ĉar la intenco de la verkisto estis tute klara kritiko de la tiama socio. Tion bone montras ankaŭ la figuro de ĉefrolanto, ja siatempe ankaŭ Swift akre kritikis la socion. "Vojaĝo en Faremido" klare montras la sensencaĵon kaj kontraŭhomecon de la unua mondmilito. La verkon karakterizas profundaj filozofiaj pensoj, samtempe vigla fantazio kaj impeta rakontado.

En la komencaj jardekoj de la dudeka jarcento ekprosperis la pli frue jam menciita hungarlingva literatura gazeto "Okcidento", kaj ĝiaj kunlaborantoj plejparte estis ĝuste tiuj konataj intelektuloj, kiuj amike rilatis al Esperanto. Al tiu rondo apartenis ankaŭ Kolomano Kalocsay, kiu komence verkis hungarajn poemojn por la revuo "Okcidento", nur poste okupiĝis pri esperantlingva literaturo.

Lia unua grava esperantlingva entrepreno estis, kiam li tradukis la poem-fabelon Johano la Brava verkitan de Petőfi Sándor. El tiu traduko oni plu tradukis ĝin al ĉina lingvo jam en la jaro 1931. Poste en 1997 aperis nova ĉina traduko, sed pri tio ĉinaj samideanoj eble scias pli multe, ol mi. Same li esperantigis la verkon "Ezopa saĝo", kiun oni tradukis al ĉina lingvo en 1980.

Kolomano Kalocsay esperantigis tiom multajn hungarajn verkojn, ke ne dezirante fari longan liston ĉi tie, mi mencias nur Hungaran Antologion kaj la poemaron de Petőfi Sándor kun la titolo "Libero kaj Amo", pri kiuj verŝajne ĉiu esperantisto literatur-ŝatanta jam aŭdis.

Ankaŭ liaj originalaj verkoj estas tre gravaj, sen ili Esperanto eble ne estus tia, kia ĝi nun estas. Ekzemple 8000 frazeologiaj esprimoj; Domfabriko (6000 esprimoj hungarlingve verkita kune kun Csiszár Ada), Plena Gramatiko (kun Waringhien) ktp.

Al la sama prospera periodo kaj rondo apartenis ankaŭ Julio Baghy, sed li ekde 1915 estis mobilizita pro la unua mondmilito kaj estis militkaptito en Siberio, tial nur post 1920 povis aliĝi al la hungaria movado.

Kalocsay kaj Baghy la faman revuon "Okcidento" verŝajne konsideris modelo, ĉar la esperantlingva revuo "Literatura Mondo", kiun ili kune redaktis, en multaj karakterizaĵoj similis al ĝi, kaj ambaŭ eldonaĵoj grave influis la aktualan, eĉ la postan samlingvan literaturon. Literatura Mondo siatempe estis la plej grava esperantlingva revuo.

Kiel mi pli frue menciis, la revolucia renoviĝo kaj leviĝo de hungara literaturo okazis la fine de 18-a kaj en la unua parto de la 19-a jarcento. La hungara poeto ĝis nun plej populara, Petőfi Sándor, vivis ĝuste en tiu periodo, kaj malgraŭ sia mallonga vivo (1822-1849) li estas unu el tiuj poetoj, kiuj verkis abundege. Lia poema fabelo, Johano la Brava estas ĝenerale konata kaj ŝatata verko ne nur inter infanoj, sed ankaŭ por plenkreskuloj. La muzikan teatraĵon, kiu estas ĝia adaptaĵo, pli ofte ĝuas plenkreskuloj, ol infanoj. Kiel mi menciis, ĝi estas tradukita al ĉina lingvo helpe de Esperanto, kaj la Esperantlingvan tradukon ni dankas al Kalocsay.

Johano la Brava fakte estas grava verko en la hungara literaturo. Ĝia lingvaĵo kaj historio imitas popolfabelojn, dum ĝia strukturo tre similas epopeojn. Iu alia fama hungara poeto, Kosztolányi Dezső, la verkon nomis hungara Odiseo. La ĉefrolantoj estas malriĉaj simplaj gejunuloj, kiuj post multaj suferoj kaj luktoj fine fariĝos reĝo kaj reĝino en Felando. La poema fabelo postulas la leviĝon de subpremita popolo. La reale prezentita kampara regiono en la tuta verko restas tute reala mondo, sed la leviĝo kaj heroaj agoj okazas en fabelaj lokoj, malgraŭ ke la landnomoj ŝajnas veraj.

Malgraŭ la romantika poezio kaj alta nivelo, la traduko de Kalocsay estas facile legebla, kaj laŭ mia propra opinio ĝi respegulas la hungaran animon kaj spiriton multe pli trafe, ol aliaj hungarlingvaj verkoj tradukitaj al Esperanto.

Grava estas tiu verko ankaŭ el tiu vidpunkto, ke ĝi inspiris la poeton Arany János verki hungaran epopeon pli "laŭregulan". Ĝi estas alia grava peco de la hungara literaturo, same studmaterialo en la bazlernejo, kiel Johano la Brava. Fakte temas pri triparta verko, sed el la tri partoj nur la unua estas vaste konata kaj tradukita al Esperanto. Ĝin tradukis unuafoje Fejes Márton duafoje Fehér Miklós. Kontraste al Johano la Brava la lingvaĵo de Toldi tute ne estas simpla, tial ĝin traduki estas superhoma tasko, kaj ĝin legi Esperante ne estas facile pro la riĉa vortostoko kaj poezia esprimmaniero. Verŝajne ne multaj havas paciencon por la veraj tradukoj, do mi kun la intenco popularigi tiun bazan pecon de hungara literaturo reverkis ĝin en tre mallonga formo zorge evitante maloftajn vortojn kaj malfacilajn esprimojn. Eĉ la poezian formon mi simpligis uzante kvar versajn strofojn anstataŭ okversaj. Oni konsideru tiun verkon kiel skizon de la vera epopeo.

En 1846 konata kaj respektata hungara literatura rondo (Kisfaludy Társaság) deklaris konkurson por verki karakterize hungareskan epikan poemon. La konkurson gajnis Arany János, kaj ĝuste per tiu unueco li fariĝis fama, post Petőfi verŝajne la dua plej fama hungara poeto, kiun rangon ĝis nun neniu povis superi. Petőfi estis la unua, kiu rapidis por gratuli al li.

Ankaŭ Arany János aplikis popolfabelajn motivojn, tio ja estis kondiĉo en la konkurso, kaj nepre influis lin la etoso de Johano la Brava. Tamen, lia heroo fakte estas historia persono, kvankam vestita per mitaj ecoj, kaj vere miraklaj aferoj (krom lia troigita forto) ne okazas. La historio apartenas al la jaroj ĉirkaŭ 1350, kiam Luizo la Granda havis gravan militon en Italio, en kiu la vera, historia persono fakte partoprenis.

Inter la prozaj hungaraj verkoj la plej populara kaj konata estas la historia romano "La steloj de Eger" el la plumo de Gárdonyi Géza. Plurfoje oni sondadis la opinion de hungaroj pri la ŝatataj hungaraj verkoj, kaj tiu romano ĉiam elstare venkis. Ĝin unuafoje tradukis Jozefo Horváth kiu

nuntempe vivas en la urbo Győr. (Oni notu lian urbon, ĉar ekzistas ankaŭ alia fama esperantisto Jozefo Horváth el Budapeŝto, kiu verkis faman lernolibron "En 30 tagoj Esperanton".) La traduko de Jozefo Horváth estas tute fidela traduko. Por plifaciligi la legadon, mi estas laboranta por fari tradukon kun pli simpla lingvaĵo, sed neniel malgrandigi la amplekson.

"La steloj de Eger" rakontas fantazian enamiĝon kaj aventurojn de historia persono, dum la politikaj kaj militaj eventoj estis precize priskribitaj laŭ fontoj aŭtentikaj. La nomoj, statistikaj datumoj kaj milithistoriaj eventoj estis zorge kontrolitaj en aŭtentikaj dokumentoj el la 16-a jarcento. En 1526 la turka armeo invadis Hungarion, kaj preskaŭ neniigis la tiaman hungaran armeon. Iom poste naskiĝis la ĉefrolanto de la romano, kaj li kiel junulo jam ĉeestis, kiam la turkoj okupis la fortikaĵon de la ĉefurbo. La kulmino de la verko estas, kiam du grandaj turkaj armeoj unuiĝas kaj provas okupi la ne tre grandan, sed el strategia vidpunkto tamen gravan fortikaĵon de Eger. Fakte la sukcesan defendon de la fortikaĵo eĉ hodiaŭ oni povas konsideri kiel preskaŭ miraklon, tiom granda estis la diferenco inter la malgranda grupo de hungaroj kaj amaso de turkoj.

Do, laŭ la amplekso, pri kiu mi ricevis peton, tiom mi povis rakonti pri la literaturo de mia nacio, kaj mi konfesas, ke la tasko, multe superis miajn kapablojn, tamen mi ne volis rifuzi la kunlaboron kun miaj respektataj ĉinaj samideanoj. Mi esperas ke oni povos ankoraŭ legi pli profesian kaj pli interesan eseon pri la hungara literaturo el plumo de pli meritaj, veraj fakuloj.

Budapeŝto la 4-an de januaro 2012.

Fontverkoj:

- *Rátkai Árpád: A Nyugat köre és a nemzetközi nyelv (tanulmány), Gvidlibro por la supera ekzameno*
- *Bilda ilustraĵo: www.irodalomfeladatok.hu*

Noto:

La teskto estas aŭskultebla ĉe: <http://esperanto.cri.cn/2781/2017/02/27/175s191721.htm>